

Eventoj

Redakcia adreso:
Budapest, pk. 87.
H-1675, Hungario
Telefono kaj telefakso:
(+36-1) 1288-258

Internacia Sendependa Revuo pri la Esperanto-Movado

junio (1) - '92

Sojle al bankroto en la Bulgara Esperanto-Asocio

Malmultaj scias, ke la Centra Oficejo de BEA estis la plej granda esperanto-centro en la mondo kun dekaj da dungitoj, multaj propraj konstruaĵoj, kaj kun grandega subvencio de la komunistarta partio. Post la reĝimŝanĝo ĉesiĝis la financa subteno, kaj la novelektita estraro frontis teruran financon situacion...

Post la somera ripozo la Estraro de Bulgara Esperanto-Asocio decidis fari pli grandan kunsidon por detale pridiskuti la problemojn de BEA. La tagordo estis sufiĉe ampleksa, sed prioritaton havis la financaj problemoj de BEA kaj la demandoj ligitaj al la proprajoj de BEA, unu el kiuj estas la Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica, kie daŭre restas pluraj nesolvitaj problemoj, tial la prezidanto de BEA inĝ. Petar Todorov decidis kunvoki la estraranojn en IEK-Pisanica, por ke ili ĉiuj konatiĝu kun la malfacila situacio en la plej granda materia bazo de BEA. La kunsido okazis la 4-an kaj 5-an de oktobro 1991.

La entreprenoj ne redonas la monon...

Petar Todorov detale kaj precize informis la estraranojn pri la nuna financa stato de *Globus*. ("*Globus, Pres-Esperanto kaj Majak*" estas entreprenoj de BEA, kiuj antaŭ kelkaj jaroj estis fonditaj el lamono de BEA por doni postan profiton. La red.) Jam naŭ monatojn *Globus* ne povas transpigi la subvenciojn al Bulgara Esperanto-Asocio pro gravaj ekonomiaj malfacilaĵoj. Multaj el la entreprenoj de *Globus* ne povas realigi siajn produktaĵojn kaj la plua ekzisto de tiuj ĉi entreprenoj estas duba. La prezidanto, inĝ. Petar Todorov, kiu estas estro de *Globus*, ne povas en la nuna ekonomia stato garantii la subvenciojn al Bulgara Esperanto-Asocio.

La novelektita estro de *Pres-Esperanto* Venelin Mitev - vicprezidanto de BEA, prezentis iom pli optimisman raporton rilate al *Pres-Esperanto*. Laŭ li je la fino de la jaro *Pres-Esperanto* havos ian gajnon, tamen ĝi tute ne sufiĉos por la realigo de la aktualigita buĝedo de BEA, kiun la Komitato akceptis dum sia kunsido en Veliko Tarnovo la 13-an de julio 1991.

Laŭ la skribe prezentita raporto de *Majak* en Veliko Tarnovo evidentiĝis, ke ĝi ankaŭ suferas pro ekonomiaj problemoj kaj de *Majak* BEA ne povas atendi subvenciojn.

Post detalaj pridiskutoj de la financaj statoj de *Globus, Majak, Pres-Esperanto* la estraranoj konstatis, ke nun finance Bulgara Esperanto-Asocio torviĝas en ege malfacila stato. La sola solvo estas, laŭ la decido de la Komitato

Por atento de Vien-ontoj

Trafika ŝparbileto "Umweltstreifenkarte"

La plej malmultekosta maniero uzi la publikajn trafikrimedojn de Vieno estas la t.n. "Umweltstreifenkarte".

La bileto enhavas 8 kuponojn. Po persono kaj uzata tago oni devas senvalidigi (= ŝtampi per aparato, troviĝanta en la tramoj, autobusoj ktp.) 1 kuponon - do ekzemple unu persono povas veturi dum 8 tagoj, aŭ 2 personoj dum

4 tagoj. Se vi iun tagon ŝtampis la bileton, ĝi validas por la tuta tago. (Se iun tagon vi ne veturas, do ne ŝtampu...).

La bileto aĉeteblas en stacidomoj, en pli grandaj metrohaltejoj kaj en pluraj kioskoj (= tabakejoj). Prezo de la bileto: 235 ATS.

Helmuth Brath, Vieno.

Internacia Junulara Festivalo - 1992.

Inter la 15a kaj 21a de aprilo okazis la 16-a Internacia Junulara Festivalo en La Salle, Italio. La festivalon partoprenis ĉ. 190 esperantistoj el 15 landoj.


Etoso de la kunveno estis la kutima, vigla, juneska, kaj estis aparte agrable, ke - kontraŭe al multaj alilandaj situacioj - la festivalon partoprenis ankaŭ aktivuloj de la antaŭa generacio (B. Cassini, R. Corsetti, M. Lipari, ktp.), do la transiro kaj sperto-transdono estas seninterrompa.

Estis malagrabla nur la dimensio de dormoĉambroj (13-18 litoj!! - kaj oni ne nomis ĝin amasloĝejo...), la ofendaj ĉambronomoj ("gravuloj, malpligravuloj, negravuloj ktp."), - kaj ke dum la festivalo sonis nek unu "spontana" esperanta kanto.



Gvidantoj de la eŭropa E-junulara movado kaptis la okazon, kaj plurfoje kunvenis por neformala kunlabora konsultiĝo. (Sur la bildo U. Matthias (D), S. Stahlberg (F), T. Pusch (D), kaj H. Brath (A)).

Dum la festivalo okazis la jarkunveno de Itala Esperanto-Junularo, kie oni elektis la novan prezidanton Alessandro Amerio. Multajn sukcesojn al li!



de BEA, pridiskuti la strukturon kaj etatliston de CO de BEA kaj konkrete decidi pri nova strukturo de la Centra Oficejo.

Ĉiuj oficistoj for...

La estraranoj longe diskutis profesie kaj kun granda respondeco la problemon kaj strebis trovi la plej precizan kaj humanan solvon je jura vidpunkto, por ke la oficistoj en la Centra Oficejo de BEA ne suferu pro la nunaj ekonomiaj malfacilaĵoj en la lando. Estis proponitaj kelkaj variantoj. *(La fina decido estis, ke la estraro maldungis ĉiujn (!) oficistojn de la asocio! La red.)*

Eĉ Pisanica malplenas

La Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica same troviĝas en ege kriza stato. Jam de monatoj la ĉambroj en la Kursejo malplenas. Mankas ripozantoj, mankas kursanoj. La mebloj malnovas, la ilaro en la kuirejo estas difektita. La Internacia Esperanto-Kursejo bezonas grandan sumon por almenaŭ parta renovigo. La subvencio devas veni de Bulgara Esperanto-Asocio, kiu tamen nun ne havas sufiĉe da mono.

La direktoro de IEK-Pisanica Svetoslav Kukudev certigis la estraranojn de BEA, ke dum la pasintaj tagoj li sukcesis ligi kelkajn kontraktojn, kiuj verŝajne helpas la Kursejon eliri el la kriza situacio.

Malgraŭ ke ni, esperantistoj, estas idealistoj, nun la financoj diktas la ŝancojn.

... pliaj fiaskoj

La konstruo de la Esperanta Domo en Sofio ne progresas. Ĝia neleĝa ekkonstruo fare de la estinta Buroo de BEA ege malfaciligas la novan Estraron, kiu nun preskaŭ nenion povas entrepreni el jura vidpunkto. Estas urĝe serĉataj eblecoj por daŭrigo de la konstruado de la Sofia Esperanto Domo.

La problemoj ligitaj kun la scienca, kultura kaj organiza agadoj de Bulgara Esperanto-Asocio pli malpli estas en sufiĉe bona stato.

La Estraro akceptis la detalan raporton de Bulgara Esperanto-Teatro, kiu en aŭgusto sukcese gastrolis dum la Kongreso de Itala Esperanto-Federacio en Torino. Sukcese kaj alt-nivele estis organizita la Internacia Somera Esperanto-Universitato en Veliko Tarnovo.

Tamen la Someraj Esperanto-kursoj en Varna fiaskis. La kursanoj en la Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica ĉi somere estis ege malmultaj kaj tial la kursoj ne estis efektivaj.

La Estraro konstatis, ki la respondeculo pri la instrua agado en la Centra Oficejo de Bulgara Esperanto-Asocio ne plenumis siajn taskojn.

Tamen kelkaj esperoj!

La Estraro aprobis la novan statuton de Bulgara Esperanto-Muzeo kaj Biblioteko. La Estraro akceptis novan regularon pri la eksterlernejoj Esperanto-kursoj, kiu aperos en "Bulgara Esperantisto".

Estas fondita regula fako "Interlingvistiko" en la Pedagogia Altlernejo en urbo Vraca. La estraranoj pritraktis la proponon pri la fondo de filio de la Akademio Internacia de Sciencoj - San Marino, en nia lando. Baldaŭ membroj de la Estraro de BEA persone renkontiĝos kun

Teorio

Ĉu malraŭma deklaro?

Deklaro por konsento

Por ĉiuj homoj lerni fremdan lingvon, eĉ alproprigi ĝin, ĉi tio signifus por ili multajn travivaĵojn, escepte kia ajn movadajn eventojn aŭ aferojn. Esperanto se ne havas celon, agadan strategion kaj konforme al ĝi taktikon, rimedon, tiam ĝi estas nur "tiel nomata" - kaj fakte ne vivanta - movado. Originala celo de la esperanto-movado estis - kaj mi ŝatus kredi ke ĝi estas ankaŭ nun - porti la pacon, amikecon, konsenton, la reciprokan estimon, honoron inter la malsamajn naciajn popolojn. En tio ludus ĉefrolon la lingvo internacia kiel rimedo, kaj ĝi servus la mision de la movado. En tiu senco esperantisto havos destiron, kaj li ne estiĝos simple nur lernanto, kiu volas alproprigi fremdan lingvon por komunikado. La komunikado de esperantisto principe ankaŭ mem devas havi specifan movadan celon. Tial laŭrajte parolus Béla Mézáros pri "niaj noblaj streboj", kaj László Tókécs dirus inter aliaj: "Cetere en la servo al nacia repacigo ankaŭ mi mem reprezentas aferon konforman kun viaj ideoj - idealoj".

Tiuj, kiuj skribas pri "pracelaj sloganoj"; pri "novtipa internacia kulturo", (kaj ili skribas ĉion laŭ senenhava maniero), tiuj esperantistoj rajte meditataj pri la "krizo de identeco". Ankaŭ opinio de Kees Ruij (Nederlando) denunciadis pri tiu krizo: "Esperanto estas moderna lingvo, nur la esperanto-movado estas malmoderna... oni forgesis, ke ekonomio estas la motoro de la

socio." Jes, vi pravas, dirus mi ĉe la lasta aserto, sed kiel rilatas tiu "motoro" al la esperantismo?.

Kie kaj en kio oni serĉu la esencon de la subtitolo "Esperanto kaj ĝia destino"?

Laŭ aŭtoroj, la "transnacia komunikado" signifas celon, sed ĝi estas fera ringo farita el ligno, ĉar tiam ili parolus nur pri memcela komunikado, babilado sen celo de esperantismo.

Do, denove ni estas tie, kie ni komencis ekiri: sur vojo de la ŝanĝado de la konceptoj, kie oni intermiksas unu kun la alia celon kaj rimedon.

Kiuj primokas la heredaĵon de Zamenhof: "interna ideo"; "stranga forto"; "fina venko", tiuj "samideanoj" (?) eble senkonscie, sed ĉiamaniere batas en ĉerko de la Esperanto-movado la lastajn najlojn.

Mi volonte inklina ekspliki miajn pensojn pri la temo: Kial havas nia movado internacian kaj pacifisman karakteron? Kion signifas neŭtraleco de la lingvo internacia? Kiel rilatas unu al la alia gepatra lingvo kaj Esperanto? Inter tradicio kaj modernigado kie estas la ĝusta vojo? - kompreneble, pli longa kaj detala por esperanta gazeto, revuo, bulteno. La edifa diskuto ankoraŭ havus racian efikon. Almenaŭ ni esperu tion!

Paulo BENNÓ

Fürst S. u. 2 H-1211 Budapest, Hungario.

En la n-ro 1. ni aperigis la Raŭman Deklaracion. Jene ni publikigas opinion de la konservativa alo. Daŭrigo certe sekvos... L.S.

la rektoro de la Sofia Universitato "Sankta Kliment Ohridski" prof. Nikolaj Genĉev por konkretigo de la propono. Estis aprobitaj novaj membroj de la Komisiono pri la jaraj premioj de Bulgara Esperanto-Asocio sur la kampo de literaturo, tradukarto, ĵurnalistiko, teatro kaj scienco por 1991.


La Estraro akceptis la buĝeton de la Internacia Danuba Esperanto-Renkontiĝo, kiu okazos novembre en Svištov. Estis aprobita same la buĝeto de la Literatura Sekcio de Bulgara Esperanto-Asocio, kiu dum la lastaj tri jaroj estas unu el la plej aktivaj Esperanto-sekcioj. Ĝi ne nur organizas gravajn landajn konferencojn, renkontiĝojn, seminariojn, sed ankaŭ entreprenis la organizon de unu el la plej prestiĝaj internaciaj Esperantaj literaturaj aranĝoj, la 11-a Internacia Literatura Forumo, kiu okazos fine de junio 1992 en urbo Vraca.

La Estraro aprobis la eldonplanon de BEA por 1992. Aparte menciindas, ke kelkaj titoloj el la nova eldonplano estos subvenciitaj ne de BEA, sed de esperantistoj kaj de Esperantaj Kulturaj Domoj, kiuj havas rimedojn. Ekzemple la Esperanta Kulturdomo en urbo Razgrad unua proponis sian subvencion por konkreta libro.

Georgi Mihalkov

proparolanto de la Estraro de BEA
Laŭ Bulgara Esperantisto, 11/1991.

Dank' al la nova estraro la situacio iom post iom pliboniĝas. Ni volonte raportus ankaŭ pri la novaj eventoj en BEA. L.S.



Ĉu rajtigita substituo de emblemoj?

Publika mesaĝo de la Kataluninteriora organizo KAE:

"Kun bedaŭro ni konstatis en la titolpaĝo de la septembra numero de la revuo Esperanto, ke UEA implicate anstataŭigas la de Zamenhof aprobitan verdastelan Esperanto-simbolon, jam tutmonde vaste konatan, per la tiel nomata rugbeopilkeca surogato, eksklude uzata kiel signo de la jubilea jaro 1987.

Eble ni eraras, sed ni forte timas, ke tiu UEA-decido fakte enkondukos du malsamajn simbolojn en nian lingvon, kio tre negative povos efiki al Esperanto kaj al ĝia tuta Movado."

El KAE-informilo 22/1992.

La kataluna asocio KAE kaj multaj aliaj forte kontraŭstaras la novan emblemon, dum aliaj multaj asocioj kaj individuoj (inter ili la profesiaj marketingistoj kaj reklamistoj) ĝoje salutas ĝin, kiel finfine moderna emblemo por nia komunumo. Sed kio estas via opinio? - L.S.

Faka aplikado

Entreprenismo en KŜŜ

Laŭ "sovietia" skalo Slavjansk estas negranda urbo (150 mil loĝantoj) de la Donecka regiono en Ukrainio. Ekde 1990 tie funkcias Tutunia (?) Instituto de Administro, kie oni "faras" manaĝerojn kaj komercistojn - fako de instruado tute nova en nia lando. La fondinto kaj rektoro de la instituto estas ekskomunisto F.I. Poddubnyi, manaĝero, kiu mem multe suferis de la kontraŭpopola komunisma reĝimo.

F. Poddubnyi estas 60-jara fidela adepto de esperanto. La instituto uzas esperanton kiel egalvaloran laborlingvon kun la rusa kaj la angla. En la instituto laboras kelkaj esperantistoj; inter ili estroj de fakoj pri juro kaj informado, instruistoj de la angla kaj esperanto, instruistoj pri dokumentado kaj "psikologio en aferecaj rilatoj", k.a.

En la instituto lekcias ankaŭ eksterlandaj prelegantoj. Jam en esperanto prelegis Trevor Steele el Aŭstralio kaj Paolo Cerretini el Italio, ambaŭ pri ege seriozaj temoj, nekutimaj por sovietianoj. La prelegoj estis interpretitaj. Ankaŭ por la publiko montriĝis, ke esperanto taŭgas ankaŭ por faklaboroj.

Ni pretas (kaj petas) kontakti profesorojn parolantajn esperanton. Anstataŭ pagi al ili niajn "lignajn" rublojn, ni disponigos senpagan restadon, kulturajn programerojn kaj prezentos al ili interesajn lokojn en nia neripetbla historia tempo. Ni esperas, ke en la tempo, kiam la rublo fariĝos konvertebla, ni sendos kaj akceptos studentojn kaj pedagogojn.

Jam hodiaŭ ni kunlaboras kun iuj samideanoj. Ni transiru pli aktive de la paroloj al la faroj.

Gennadij Ŝilo vicprezidanto de UkrEA
aŝa 17, Slavjansk-6, Ukrainio 34206
(laŭ Esperanto, 11.1991)

Novaj Terminaroj

Terminologia Esperanto-Centro eldonas nun du sisteme aranĝitajn terminarojn, Hidraŭlaj Meĥanismoj kaj Stomatologio. Preparataj estas jenaj terminaroj: Terminologio (terminaro de la fako "terminologio"), Aero-naŭtiko I, Akustiko, Pelt-industriaj Operacioj, Komputiko, en nunjara plano estas ankaŭ revizio de esperanto-normo "Esperanto-normo" (preskribo kiel aspektu sisteme aranĝita plurlingva terminaro por normigo kadre de TEC-UEA en kongruo kun internaciaj normoj ISO) kaj tradukita romano por skoltoj "Knaboj de kastora rivero". Ĉiuj publikaĵoj aperos prefere sur disketoj sub datumbaza sistemo "paradox" kun komforta trarigarda programaro (se dezirante rigardi alfabetajn registrojn de unuopaj lingvoj ktp.). Presitaj aperos la publikaĵoj nur je speciala deziro (kiel fotokopiitaj multobligejoj de komputilaj printaĵoj). Planata prezo de la unuaj publikaĵoj - Hidraŭlaj meĥanismoj kaj stomatologio - estas 32 USD aŭ egalvaloro. En Ĉeĥoslovakio vi povas ilin aĉeti kontraŭ 288 CSK (nur se vi persone povas transpreni la publikaĵojn - via ŝanco dum la Praga antaŭkongreso!). Esperantistoj ricevas

Supersignoj senprobleme!

Karaj amikoj,
Via artikolo pri la komputilaj programoj kiuj "lernis la esperanto-supersignojn" surprizis min. Mi insistas, ke iu ajn maŝino kiun mi uzas por esperanto posedu tiajn supersignojn. Mi posedis antaŭ 30 jaroj ordinaran porteban skribmaŝinon kiu posedis tiujn supersignojn. Kaj nun mi uzas multe pli modernan vort-procedilon kiu tre varikapable sen ia ajn malfacilo havas supersignojn. Kial la esperantistoj tiel facilanime akceptas, ke ili rapide aĉetu maŝinon kiu ne posedas tiujn? Postulu!

Ĉi tiun leteron mi komponas sur maŝino nomata Starwriter 80. Ĝi ne nur presas la supersignojn (jes, inkluzive de la procedilo estas presmaŝino) sed variigas la grandon kaj la liter-


e ĉ ĉ ĉ Ĉ
 ŝ s s s s s
 ŭ ŭ Ŭ KAI TIEL PLU.

ĈI DONAS MARKITAN FONON

DE PLURAJ SPECOJ ĈI TIEL

facojn en diversaj formoj.

Krom ĉiuj tiuj bonegaĵoj, ĝia "menuo" kaj la aliaj instrukcioj povas aperi en dek lingvoj:



germana, dana, angla, franca, hispana, norvega, sveda, finna, nederlanda, itala.

Kaj substrekado estas ebla laŭvole.

Pluaj bonaĵoj: ĝi havas memoronkapablon 60 kb kaj stakas vian laboron sur disketojn 720 kb. Ĝi kapablas korekti viajn nacilingvaj literumerarojn. La pezo: nur 7 kg.

Ne ĉiujn avantaĝojn mi listigis, nur la plej utilajn al mi.

Ekzistas multaj aliaj servoj enfabrikitaj.

Kvankam la menuo k.t.p. ne aperas en esperanto, evidente oni povas uzi ĝin por ĉio necesa en la lingvo.

Mi neniam bedaŭras la akiron de ĝi. Oni anoncis, ke aperos baldaŭ eĉ pli bona formo de la maŝino!

Ĝin fabrikas la firmao Canon, kaj tiu kiun mi uzas por la Esperanto-Asocio de Britio kostis £500.

Will Green, London, Britio.

Kvankam tiu ĉi letero aspektas kiel kvazaŭ-reklamo, ni volonte aperigas ĝin senpage. Ni tre ĝojus, se ĉiu esperantisto estus tiel postulema (!), kaj havus tiom malmulte da printilaj problemoj...

Kaj eble Gábor Deák-Jahn (ĉe la firmao Tramontána, H-1026 Budapest, Júlia u. 2/a) povas solvi la problemon, ke ankaŭ la menuo aperu en esperanto...

L.S.

Komerca aplikado

En septembro 1992 la E-klubo "BUKOVINA", kiu fondiĝis en 1990 en Suceava de Rumanio, okazigos la unuan renkontiĝon de la fakuloj pri la komerco kaj industrio en Suceava. Inĝinieroj, ekonomikistoj, komercantoj, teknikistoj, laboristoj, k.t.p. dezirantaj kunlabori rilate al kreskigo de la varproduktado kaj disvendado per Esperantaj rilatoj petu detalojn al la adreso: Inĝ. Bodale Ionel, Str. Mesteacanu-lui Nr. 1 Bl. 16 SC.

BAP 9 ET.11 RO-5800 Suceava, Rumanio.

Mi laboras kiel makleristino/komercistino, kaj mi eble povas helpi al Vi, se vi bezonas varojn el Germanio aŭ Aŭstrio. Mi povas peri resp. makleri preskaŭ ĉiujn varojn (temas pri pli ol 60.000 objektoj) el tiuj landoj. La pago devas okazi en konvertebla valuto.

Mi nun specialigas en la direkto "arto kaj similaĵoj", kaj serĉas diversajn tiuterenajn objektojn.


Por respondo bv. nepre aldoni respondokuponon.

Ursula Zilvar,

Grubenhagenstr. 8 DW-3420 Herzberg Germanio



Eldonas: INTERFAKTO, P.O.Box 42205, Washington, D.C. 20015, USA. Abonprezo: 15 USD. 4-foje jare, 4 p.



Movado

Ĵus aperis:

Pasporta Servo 1992!

Haveblas en la esperanto-merkato ekde nun la nova versio de eble la plej konata bezonaĵo por la vojaĝema esperantisto:

APERIS LA ADRESARO PASPORTA SERVO-1992!

En la ĉi-jara listo aperas en 59 landoj preskaŭ 900 adresoj de gastigantoj, kiuj pretas akcepti vojaĝantajn esperanto-parolantojn.

Post forigo de la necertaj adresoj restis tamen ankoraŭ tiom multe da adresoj. Tio ŝuldiĝas unue al varbado de homoj kiuj ne jam re-aligis, kaj due al subita alveno de amaso da aliĝiloj el Rusio.

Preskaŭ ĉiu konata libro-servo povas liveri al vi la libron. Se vi tamen ne povas mendi ĉe iu proksima libro-servo, kompreneble ĉiam eblas mendi rekte ĉe Universala Esperanto-Asocio. La prezo ĉe UEA estas 18,00 NLG. UEA donas sesonan rabaton ĉe mendoj de minimume tri ekzempleroj. Al la kostoj aldoniĝas la ekspedokostoj: 3,20 NLG se oni mendas nur unu ekzempleron de Pasporta Servo (ŝipa transporto); kiam oni mendas pli aŭ kun aliaj libroj validas la kutima tarifo por sendokostoj (10% de la neta faktursumo, sed minimume 5,00 NLG).

La landaj sekcioj de TEJO kaj la landaj organizantoj de Pasporta Servo el la eks-socialismaj landoj, Afriko, Latina Ameriko kaj ĉiuj landoj de Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Koreio) povas aĉeti limigitan kvanton kontraŭ ege subvenciita prezo de 4 guldenoj (plus af-rankokostoj). Tiujn kajerojn oni rajtas vendi nur al homoj el tiu ĉi landogrupo.

Se oni volas scii pli pri Pasporta Servo oni povas peti informilon (kun aliĝilo per kiu oni povas mem iĝi gastiganto) ĉe: *Pasporta Servo*,

p/a Rob KEETLAER, postbus 2310, NL-1000 CH Amsterdam, Nederlando. Tiu ĉi adreso estas la nova adreso de Pasporta Servo kaj validas por (preskaŭ) ĉio, kio rilatas ĝin. Nur mendojn oni ne direktu al tiu adreso.



Rim: La surskribo sur la titolpaĝo "listo de gastigantoj de TEJO" estas malkorekta, ja la gastigantoj ne estas gastigantoj de TEJO, krome ne estas kondiĉo membri en TEJO por esti gasto aŭ gastiganto...

Pasporta Servo ne estas servo de TEJO, ĝi estas servo por esperantistoj, TEJO nur prizorgas ĝian funkciigon.

La servon povas utiligi (kaj gastigi kaj gastigi) ne nur TEJO-aĝuloj, sed ĉiu esperantisto!

Tial ke Pasporta Servo estas unu el la plej konataj kaj renomaj servoj, estus ege utile, se estonte ĝi aperus sub la ŝildo: "kaŭn komuna aŭspicio de UEA kaj TEJO". Tio ne fortimigus multajn iompli-frue-naskiĝintajn esperantistojn, kiel la nuna slogeno fakte povas fortimigi ilin.

L.S.

Amika Societo honore al Kolumano Kalocsay

Celo de la Societo: gardi la memoron de tiu eminentulo de Esperanto:

1. konigo kaj disvastigo de liaj medicinaj kaj literaturaj agadoj;
2. reeldono de liaj elĉerpitaj libroj;
3. ordigo kaj aperigo de liaj postlasitaj manuskriptoj;
4. kolektado de liaj verkoj aperintaj en diversaj gazetoj, kaj poste aperigi la materialon ordigitan laŭteme;
5. helpi esperantajn organizojn, societojn kaj ĉiujn interesitojn per diversaj materialoj (biografiaj kaj bibliografiaj indikoj);
6. zorgado pri liaj memoraĵoj: tomo, strataj memortabuloj, publika busto starigita en 1986 en la naskiĝloko Abaujszántó, riĉigo de la Kalocsay-memorĉambro inaŭgurita en 1983.
7. Aranĝo de solenaĵoj, internaciaj renkontiĝoj, diversaj konkursoj ktp.

Aliĝi al la Societo rajtas ĉiu esperantisto, kaj ankaŭ societoj.

La estraro de la Societo kore invitas amikojn kaj respektulojn de la granda klasikulo de la Esperanto-kulturo.



Por pliaj informoj turnu vin al:

Ada CSISZÁR,
Zsigmond tér 1/b. H-1023 Budapest,
Hungario.

Esperanto defendata

Karaj Redaktoroj!

Jes, mi havas respondon, kiu eble amuzas vin, ĉar vi estas ĉudapeŝtanoj.

Antaŭ unu/du jaroj oni intervjuis min pri esperanto en la ŝtata radio.

"Kial la lingvo formortis?" - komencis la intervjuisto.

"Kial formortis la telefono?" - mi respondis, klarigante post sufiĉe longa paŭzo, ke oni inventis en la sama epoko kaj esperanton kaj la telefonon, kaj ke troviĝas nun ĉe ni multaj telefonoj kaj malmultaj esperantistoj, dum en Budapeŝto estas tute inverse.

Sendube vi nun havas multe pli da telefonoj ol antaŭe sen perdi (mi esperas) esperantistojn. Tamen, mi ĝojas, ke mi tiam pensis pri la manko de telefonoj en via urbo, ĉar tio donis al mi bonan pretekston plupropagandi esperanton.

Max Wearing, Aŭstralio.

Kunvojaĝanto serĉata!

Se vi ne volas veturi sola al iu e-aranĝo, vi povas serĉi kunvojaĝantojn. Se vi havas libera(j)n loko(j)n en via aŭtomobilo, vi povas dividi inter si ankaŭ la benzinkostojn! Ankaŭ en trajno estas pli agrable veturi en kompanio.

Do, se vi serĉas kunvojaĝanton, anoncu ĝin en tiu ĉi rubriko. (Loko kaj dato de via starto, celo, itinero kaj via adreso).

Alvoko

Cirkulero de Rondo Takács

Rondo Takács estas trimembra esplora teamo de d-ro Árpád Máthé, s-ro Luis Ma. Hernandez Yzal kaj s-ino Ana Maria Molera Urgelles, kiuj de longa tempo kolektas datumojn pri la intaj kaj antaj planlingvaj periodaĵoj (- do ne nur, sed inkluzive ankaŭ pri esperanto). La slipara katalogo nun havas jam pli ol 8.200 titolojn! Post trastudo de diversaj katalogoj, bazaj libroj bibliografiaj, tiuj pri la historio de la planlingvaj movadoj, en 1991. estis komencita la la trastudo de la havata aro de planlingvaj periodaĵoj.

Por helpi tiun laboron *Rondo Takács* petas vian helpon.

Estus ĝoje akceptata la listo de tiuj planlingvaj periodaĵoj, kiujn vi jam ne bezonas, aŭ kiujn vi povas prunti aŭ eventuale vendi.

Rekompence la *Rondo Takács* ofertas, ke dum la trastudo de periodaĵoj (pli ol 8.000 jar-kolektoj, el ili 3.640 kompletaj) ili volonte kolektos informojn pri temo, proponita de Vi.

Viajn leterojn kun la listoj bv. direkti al:

d-ro Árpád. Máthé,
H-1125 Budapest, Tusnádi u. 14, Hungario.
(Laŭ Debrecena Bulteno, 64/1991.)

Konkurso

La pasintjara OSIEK-premio, aljuĝita al brazilano

OSIEK-premio

La 19-an de julio 1991. en Poprad (Ĉeĥoslovakio), kadre de la Internacia Esperanto-Konferenco, la "OSIEK-premio 1991" estis atribuita al prof. Evaldo Pauli, prezidanto de FAT (Filozofia Asocio Tutmonda), pro lia verko "Mil jarojn de Kristana Filozofio". La premion, konsistantan el 300 ekuoj, s-ano Evaldo Pauli donacis duone al la esperanta revuo "La Gazeto", duone al la "Fondaĵo Simpozio". La "OSIEK-premio" estas laŭstatute atribuita al verko ne beletra.

El KAE-*Informilo*, Nr. 22.

Arangoj

Estimataj Gesinjoroj,

"Monda Turismo" gvidas dum la 1a de septembro 1991 ĝis 31a de majo 1992 Internacian Studumon pri Turismo, kiun sukcese partoprenas tridek gestudentoj. Surbaze de la ĝisnunaj spertoj de la studumo ni invitas Vin aliĝi al nova, naŭmonata

Internacia Studumo Pri Turismo Kaj Komerco

kiu daŭros de 01.09.1992 - 31.05.1993. La kosto de la naŭmonata studado egalas al entute 600 guldenoj.

Por la gestudentoj eblas loĝado en la hotelo Esperanto en Bydgoszcz kontraŭ 10-20 guldenoj tage, same mangado en la hotela bufedo. Eblas ankaŭ malmultekostaj eksterlandaj praktikoj pri turismo kaj komerco.

La Internacian Studumon pri Turismo kaj Komerco 1992/1993 organizas *Monda Turismo* (turismaj temoj) kaj la *Komerca Lernejo en Bydgoszcz* (komercaj temoj) sub aŭspicioj de pluraj organizoj.



Samtempe *Monda Turismo* atendas sinproponojn de prelegantoj, spertaj en turismo aŭ komerco, kiuj pretus veni al Bydgoszcz en iu semajno de la studjaro 1992/1993 por prelegi en esperanto. Ni antaŭvidas seriojn de prelegoj po 10 ĝis 40 horoj semajne. Por la akceptitaj prelegantoj *Monda Turismo* garantias senpagan loĝadon en la hotelo Esperanto en Bydgoszcz dum la preleg-semajno, mangadon kaj poŝmonon; oni ne repagos la vojaĝ-kostojn.

Pliajn informojn kaj aliĝilojn petu ĉe:

"Monda Turismo"
Str. M. Skłodowskiej-Curie 10.
PL-85-094 Bydgoszcz, Polio.

Ĉu esperanto restu nur kluba lingvo?

Ĝis nun povas okupiĝi pri esperanto nur homoj, kiuj disponas pri kaj tempo (por klubumi, legi, kongresi), kaj mono (por kotizi, aboni, vojaĝi)!

Tiu bedaŭrinda stato ege bremsas ĝian aplikadon, eĉ ĉe aktivuloj kiuj dezirus fari pli.

Jen tri ekzemploj el dekoj:

1. Doc. J.H.Gu, Ĉinio, 20.10.1990.: "Unu ordinara aerpoŝta internacia letero peza je 10 gramoj forrabas almenaŭ unu procenton de monata salajro por supera instruisto";

2. Prof. I. Bociort, Rumanio, 18.01.1991.: "Ni ne plu povas aboni eĉ la revuon EL POPOLA ĈINIO ĉar la abono egalas la trionon de salajro de universitata asistanto";

3. Ing. K. Votocek, Ĉeĥoslovakio,

04.02.1991.: "Kun samideano ni kompiladis Eĉekan geodezian vortaron kaj planis ankaŭ geodezian terminaron kun difinoj en e-o, sed tiu ĉi laboro nun haltis ĉar mi havas pli gravajn zorgojn".

Ĉar esperanto estas nur djaranga lingvo, kiu ne donas profiton, sed forrabas monon, estas tutnormale ke ĝi estu flankenigita, kiam estiĝas problemoj familiaj, financaj, profesiaj...

Ĉu ne endus pripensi kiamaniere e-o povus fariĝi unuaranga, t.e. utila profesie kaj mondana lingvo?

Se ni volas nur tion, ke esperanto estu nur kluba lingvo, tiam ĝi jam delonge finvenkis!!!

Germain Pirlot, Belgio

1992 decembro 11-13.

3a Internacia Seminario "La Zamenhofa Heredaĵo" Bjalistoko

Jam la 3an jaron sinsekve ni kunvenas por studi kaj paroli pri la fruktoj de Zamenhofa aktivado. Ĉi-jare ni dediĉos specialan atenton al la Esperanto-Centroj ekzistantaj en la mondo kaj la lerneja kaj universitata instruado kaj aplikado de la Internacia Lingvo. Loko: porinfana klinika hospitalo L. Zamenhof en Bjalistoko. Aliĝu ĉe:

Esperanto-Centro Ludoviko Zamenhof,
S.P. 67, PL-15-950 Bialystok
Fax: +48-85-20255

27.06.-01.07.1992.


11a Internacia Literatura Forumo

La fama arango de la kooperativo *Literatura Foiro* (kunorganizata de Vraca E-Centro) ĉi-jare okazos en Vraca, Bulgario, kaj pridis-kutos la problemojn de la porinfana esperantlingva literaturo. Prelegantoj estos Giorgio Silber, Perla Martinelli, Ljubomir Trifonĉovskij, Julian Modest, kaj aliaj. Du teatraj premieroj, koncertoj de Nikolin', lingvaj ludoj kun Gilena, koncerto en kaverno Ledenika, kaj pluraj alioj pliriĉigos la programon de la arango.

Pliaj informoj kaj aliĝo ĉe:
Esperanto-Centro, pk. 66, BG-3000 Vraca, Bulgario.
Telefono: +359-92-24890

Esperanto konferenco en Ateno

18-24jul92



LINGVO KAJ KULTURO

Prelegoj kaj diskutoj

Riĉa kultura programo

Distraj vesperoj

Bankedo kaj balo

Tri tagoj al grekaj insuloj

ALIĜKOTIZOJ, INFORMOJ

Membroj de OSIEK 72 ekuoj (510 francaj frankoj). Ne membroj 100 ekuoj (700 francaj frankoj). Rabato: 15 % por paro, 30 % por studento, 50 % por orient-Eŭropano.

Informoj kaj pagoj ĉe la kasisto de OSIEK:

Eric LAUBACHER

53, avenue Henri Barbusse

F-92140 CLAMART Francujo

tel. (16 1) 46 45 41 26

Postĉekkonto: 1 399 87 R PARIS

Internacia biciklado!


EYFA (Eŭropa Junulara Arbara Agado, neesperantista kadroorganizo por ĉ. 350 junularaj kaj naturmediprotektaj organizoj) ankaŭ ĉi-jare organizos la 2-monatan grandan bicikladon de la Freiburga Junulara Festivalo (Germanio) al la somera "alternativa" tendaro Ecotopia (Bulgario). La biciklado startos la 12-an de junio, kaj rulos laŭ la rivero Danubo. Eblas ankaŭ parta (en

tempo, en distanco) partopreno.

Oficiala lingvo de la karavano estas la angla, sed kiel kutime, ĉeestos granda grupo de esperantistaj biciklantoj.

Pliaj informoj ĉe BEMI, aŭ ĉe

Katarina Matejvikova
Ĉeĥoslovakio
Martineckova 3,
CS-821 01 Bratislava,
Tel.: +42-7-219293



Esperanto en radio

Svisa Radio Internacia volas rezigni pri siaj esperanto-elsendoj

La Svisa Radio Internacia jam dum pli ol 40 jaroj elsendis en esperanto. Nun subite oni decidis inter la novaj mastrumantoj forigi la esperanto-elsendojn. Tio estas netolerabla decido, kaj necesas vasta reago de la tuta Esperanto-mondo. Mi emas diri, ke estas kvazaŭ sankta devo de ĉiu esperantisto verki kaj sendi protestleteron al Svisa Radio Internacia (Svisa Radio Internacia, Postfach, CH-3000 Bern 15). La leterojn sendu en iu-ajn lingvo tamen prefere en esperanto. Kaj vi povas aserti, ke SRI riskas vin perdi kiel aŭskultanto, se tiu decido ne estos rekonsiderata.

Dietrich M. Weidmann, Svisio

Pli da intervjuoj

En 1992, Pola Radio decidis aktualigi sian internacian adresaron. Samokaze, ĝi plifirmigos - parole kaj letere - siajn kontaktojn kun eksterlandaj aŭskultantoj.

Ankaŭ dum la venontaj semajnoj, la Esperanto-redakcio elsendos surbendigitajn intervjuojn kun korespondantoj el 9 landoj (aŭ pli). Specialaj programoj okazos dum kaj post la Universala Kongreso en Vieno.

Aŭskultu la esperanto-elsendojn de Pola Radio, ili okazas ĉiutage!

Viajn leterojn sendu al:

P.O. Box 46. PL-00-950 Warszawa, Polio.
(laŭ la bulteno "Mallonge")



RADIO ESPERANTO!

"En la unua numero de *EVENTOJ* vi re-produktis la liston de radio-elsendoj, aperinta en la revuo Esperanto. Male al aliaj esperantaj gazetoj, tiu revuo sisteme kaj vole ignoras niajn radio-elsendojn, kiuj daŭras de la 1a oktobro 1981(!) ĉiuvendrede, de la 18a ĝis la 19a kaj estas aŭskultata de la tuta esperantistaro de la pariza regiono en la frekvenco 89,5 MHz."

Radio Esperanto,
145, rue Amelot, F-75011 Paris, Francio.

Mondsindikatoj

Lige (ĉu ene?) al SAT agadas la rondo de mondsindikatoj kiuj de tempo al tempo (*sajne monate*) aperigas 3-4 paĝan cirkulerojn. Ĉeftemo de la aprila letero estas la (*surfaca - La Red.*) komento de la Karakasa Kongreso de la Internacia Konfederacio de Liberaj Sindikatoj.

Slipoj de "Mondsindikatoj / La SAT-frakciano" kaj aliaj sindikataj materialaj en esperanto estas haveblaj ĉe:

Mondsindikato, Z. d. FGFB - Esperanto
3, rue des Rasseurs, B-5000 Namur, Belgio.



Esperanto-koruso en Pireneoj

La Tut-Pirenea Esperanto Koruso naskiĝis printempe de '91. dank' al la prezidanto de Muzika Esperanto-Ligo (Dimitr Terziev el Sofio, Bulgario), kiu venis al Arjeĝo, urbeto en Francio, norde de Andoro, por gvidi staĝon por korusemuloj.

Pro la sukceso estis decidite daŭrigi tiun agadon, kaj oni volis arigi pli da interesigantoj de Pireneaj Regionoj kaj pli fore. Semajnfinaj renkontoj okazis en aŭgusto, oktobro kaj decembro '91.

La dua koruso-staĝo okazis en februaro sub la gvido de Saskia Idzerda (prezidanto de TEJO). La partiturojn por la staĝo esperantistigis Martin Haase (D), Mark Fettes (NZ), Dario Besseghini (I), kaj Gerrit Berveling (NL). Ni fine prezentis sufiĉe bone taksitan koncerton en la loka fest-halo kun 24 gekorusanoj.

Pro la ĝisnunaj sukcesoj ni planas korusajn staĝojn inter 17-24 de septembro 1992., kaj 21-28a de februaro 1993 en La Freychede, Montferrier, F-09300 Lavelanet. Venu kanti kun ni! Ni ĝoje ricevus ankaŭ partiturojn.

Pliaj informoj ĉe:

JORGOS, F-09120 Saint Felix-de-Rieutort.
Tel.: +33-61-608683

Recenzoj

Kunmetitaj verboj per la sufikso "-UM"

Euclidas Carneiro da Silva
jaro?, prezo? p.25, A4

La aŭtoro listigas 130 verbojn per sufikso -um, kiuj NE estas derivitaj laŭ la kvar bazaj uzoj de la sufikso laŭ PIV. Ĉiuj ekzemploj estas ne de li elpensitaj, sed trovitaj en la esperanta literaturo, (plejparto de ili troveblas sur la listo de esperantaj klasikajoj), kun detala fontindiko kun la cititaj frazoj mem.

Associação Mogiana de Esperanto,
R. Cap Paulino Freire, 366,
08700 Mogi das Cruzes SP, Brazilo.

Movada lernejo

Pasporta Servo

Pasporta Servo estas unu el plej famaj esperanto-servoj. Kontraŭe al sia nomo ĝi ne donas pasporton, sed ofertas senpagan tranokt-eblon por esperantistoj.

La funkciigo de P.S. prizorgas TEJO, do ĝi helpe de landaj organizantoj kolektas la adresojn de gastigantoj, aperigas ilin en kajero, kaj zorgas pri ilia vendado. Tiuj, kiuj estas en la listo (= la gastigantoj) ricevas la adresaron senpage, aliaj devas aĉeti ĝin. (La ĉi-jara prezo estas 18 guldenoj, kio estas prezo por 1 tranokto en okcident-eŭropa junulara hotelo. Pluraj netranspagi-povaj landoj havas rabatitajn prezojn. Pri vialanda prezo demandu vian libroservon, aŭ la landan organizanton.)

La servo funkcias ne laŭ la principo de reciprokeco, do vi povas uzi la senpagan tranokteblecon, eĉ se vi ne akceptas gastojn!

Multaj avantaĝoj...

Avantaĝo de P.S. por la gastiganto estas tio, ke en sia loĝejo povas renkonti internacian vizitanton, kaj povas flegi kontaktojn dise en la mondo. Avantaĝo por la gasto estas (krom la senpaga tranokteblo) la loka kontakto, kiun oni povas demandi, kun kiu oni povas preparoli plej diversajn aferojn.

Por uzi la eblecojn de P.S. vi devas aĉeti la adresaron, kaj surskribi vian nomon. Ĉiu devas havi propran kajeron, ĉar la eldono ne estas senpaga, kaj ĉiu devas iel kontribui. La gastiganto rajtas ne-akcepti vin, se vi ne havas propran adresaron.

P.S. ne estas hotela servo, ĝi estas pli intima kontakt-eblo. Estas ne bele aperi nur malfrue vespere kaj poste senvorte foriri, preskaŭ ĉiam la gastiganto volas iom babili kun vi, ekkoni vin kaj vian landon.

La gastiganto ofertas nur senpagan tranokt-eblon, sed ne devas ankaŭ manĝigi vin. Se li tion ofertas, vi povas akcepti ĝin, sed ne rajtas postuli.

Por la gastigo kutime oni donas malgrandan donacon (plej ofte kun nacia karaktero, aŭ ion esperantaĵon).

Ne nur junulara!

Pasporta Servo - kvankam estas prizorgata de TEJO, tamen - ne estas nur junulara servo. Ankaŭ la gastigantoj, kaj ankaŭ la gastoj povas esti pli aĝaj. Almenaŭ konversacinivela esperanto-scio estas minimuma kondiĉo.

Por esti gasto, vi nepre devas ANTAŬE interkonsenti kun la gastiganto. (Telefona interkonsento - en la ĉiutaga praktiko - estas multe pli operativa.)

Se vi hezitas iĝi gastiganto, vi sciuj, ke la gastiganto ne nepre devas ĉiam akcepti gastojn, vi mem povas tion difini.

Estas ankoraŭ pluraj detaloj, kaj demandoj, al kiuj respondas la informilo de P.S. Petu ĝin (prefere kun 1 IRK) de la P.S. centra respondeculo:

Rob Keetlaer,
Postbus 2310, NL-1000 CH, Amsterdam,
Nederlando.

Populareco de "fremdlingvaj" radio-elsendoj estas mezurata per la nombro (!) de alvenantaj leteroj. Ilia nesufiĉa kvanto povas kaŭzi la nuligon de tiuj elsendoj.

Konsciu, ke ankaŭ via letero al esperanto-radiostacio estas elementa bezono! Deĉiĉu kelkajn minutojn por ili, kaj skribu leteron al via esperanto-radiostacio!

Skribu ankoraŭ hodiaŭ!

Anoncetoj

Se vi interesigas pri kristana literaturo, bv. skribi laŭ jenaj adresoj:

1. Anna Sandgren, Esperanto-Misio
Rönngatan 15, Östansjö
S-694 02 Hallberg 2, Svedio
2. Walter Vanden Heede
Italiaan 26, B-8550 Zwergen, Belgio
3. Kazimierz Leja (pri biblio studado)
Konckiego 2, PL-40-040 Katowice, Polio.

ESPERANTO-KLUBO DE LAHTI prezentos sin kaj esperanton en la tn. "Mola Vendredo" - festo 21.-22.8.1992 en Lahti. Bonvolu skribi poŝtkarton por tiu okazaĵo. Adreso: p.k. 79, SF-15101 Lahti, Finnlando.

"La internacia E-familio estas la realo, ĉar mi helpas al Vi trovi sinjor(in)on de via koro inter multaj diversaj geesperantistoj."

RUSIO 660075, Krasnojarsk,
p.k. 2420 "INTIMO"

Mi estas 27-jara studento pri magistro. Mi volas fondi esperantan internacian familion, kaj serĉas esperantistan partnerinon. Mi povas aranĝi por ŝi laboron ĉi tie, kaj povas prezenti monon por ŝi vojaĝi al Ĉinio. Mi esperas je amikino, kiu amas la esperanto-movadon kaj pacon.

Pan Xian Wei, literatura Departamento,
Xin Tiang Universito, Xin Tiang, Ĉinio.

Uzittajn telefonkartojn deziras interŝanĝi kun la tuta mondo Jan Torfs, Vrijgewelde 27, B-2200 Borgerhout, Belgio.

La komerca firmao J.V. Sof kun la Plzena Esperanto-Klubo eldonas gazeton "Plzena Informanto". Ni invitas vin kunlabori - por sukceso kaj plua disvolvigo de la esperanto-movado. "Nur aplikado de esperanto en la komerca vivo montros ĝian utilecon." Skribu al:
J.V. Sof, Koterovska 30,
CS-301 41, Ĉeĥoslovakio.

Buso da geamikoj serĉas neluksajn tranoktejojn (tendumejo, gimnastejo) kaj kontaktojn kun lokaj esperantistoj fine de julio laŭ la sekva itinero: Vaduz, Bern, Genf, Nevers, Tours, Parizo, Bruselo, Antverpeno, Amsterdamo, Bonn, Stutgarto, Munkeno. Ni estas ĉ. 40 hungaroj, kelkaj esperantistoj kun siaj gesamideanoj.

s-ino Szilvia Horváth,
Kosztolányi tér 7. I/6.
H-1114 Budapest, Hungario.

Aŭtoro de la malfermita letero en la numero 4. aprilo(2)-92. sur la paĝo 4. estis ne Claude Piron, sed Germain Pirlot. Pardonon! - La red.

EVENTOJ, esperanto nyelvű információs lap.
Nyit. sz.: B/TSZL/85/1991. ISSN 01215-959 X.

A kiadó és a szerkesztőség címe:
H-1675 Budapest, pf. 87. Tel: 1288258.

Megjelenik kéthetente. Kezbesíti a HELIR.
Készült az M & M nyomdában:
H-1161 Budapest, Bercsényi u. 10.

EVENTOJ, dusemajna gazeto pri la esperanto-movado.
Eldonas Kultura Esperanto Asocio
kaj LINGVO-Studio, Budapest.

Respondeca eldonanto kaj ĉefredaktoro László Szilvási.
Teknike redaktas Sándor Hideg.

La redakcio ne nepre konsentas pri la enhavo de unuopaj artikoloj, kaj ne respondos pri la anonc-enhavo.

Informilo pri Vieno

Pro la elĉerpiĝo de la unua eldono, estas represita la 12-paĝa, (10x21 cm) kolora faldprospekto pri Vieno. (Multaj utilaj adresoj kaj informoj, ne nur por la UK-partoprenantoj). Vi povas peti ĝin ĉe

Wiener Fremdenverkehrsverband
Obere Augarten Str. 40, A-1020 Wien, Aŭstrio.



En nia antaŭa (006) numero en la rubriko "Movada Lernejo" ni havis gravan preseraron. Mallongigo de la organizo SAT korekte estas: SENNACIECA Asocio Tutmonda! Pardonu pro la eraro!

Mallonge

Kultura Centro Esperantista (KCE) bonvenigas novajn interesajn prelegtemojn por riĉigi siajn venontajn programojn. Se vi volas proponi prelegon, ĝi povas esti por semajnfino aŭ tuta somera semajno. Ĉiukaze, vi simple sendu al ni skriban priskribon de via prelego. Novaj prelegistoj, kiuj sin proponas por somera aranĝo, estos unue invitataj dum semajnfino por provprelegi kaj renkontiĝi kun ni.

Kultura Centro Esperantista,
P.k. 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svisio.

Haitia Esperanto-Asocio, Luzincourt F. Adrien, 34 rue Joseph Janvier, Port-au-prince, Haitio, petas helpojn por starigi bibliotekon.

Informilo de Ukrainia Esperanto-Asocio, aperas 12 foje en jaro, 26x17 cm, 4 paĝoj, tajpita kaj fotokopiita.

Abono por individuaj kaj kolektivaj UKrEA-membroj senpage (1 ekz.). Por aliaj (inkluzive ankaŭ eksa Sovetio): 12 rubroj + 12 afrankitaj kovertoj. Sendu al: 252001 Kiev-1, pk. 122. Eksterlandaj abonantoj bv. pagi 6 USA dolarojn al la konto ĉe UEA ukre-j, informante pri tio UKrEA.

laŭ Informilo Nr. 1/1992.

La revuo Bulgara Esperantisto, oficiala monata organo de Bulgara Esperanto-Asocio (BEA) havas novan ĉefredaktoron. Post la eksigo de Maria Jankova la redakcian laboron gvidos alia internacie konata persono, d-ro Kiril Velkov.

**Nia forto estas en nia nombro
kaj en nia entuziasmo.
Ni fieras esti esperantisto,
kaj klopodas ion fari por ĝi.
Ĉu ni povas kalkuli ankaŭ je Vi?**

Korespondi deziras

30 gelernantoj (16-17 jaraj) de mezlernejo "50 Vjetori i Pavarësisë" kun samaĝuloj. Adreso de la instruisto: Bardhyl MEZINI, Rruga "Maliq Muço" Pall. 50. Ap. 3. Tirana, Albanio.

Esperanto-Asocio Durrës, p/a Luan Jauoi, Rruga "A. Goga" Ap. 357/2, Durrës, Albanio.

Nehat SOKOLI, biologo 30-jara, Lagja 3, Pall. 4 Shkodra. 4. Kukës, Albanio.

Nun mi havas 69 jarojn. Antaŭ 5 jaroj mi eklernis esperanton, kaj nun mi volas trovi korespondan partneron 60-70 jaran. Ĉu iu volas korespondi kun mi? s-ino Kecskeméti Katalin, H-6041 Kerekegyháza, Széchenyi u. 152. Hungario.

Marta Skolkova, Hurka 58, CS-373 15 Nova Ves u Ceskych Budejovice, Ĉeĥoslovakio, 18 jara studentino, interesigas pri muziko, dancoj, manlaboroj ktp.

Geedzoj Valerij (E-instruisto) kaj Elvira Malikin (pediatro), Per. Vuzovskij 16-83, Krasnojarsk, Siberio, 660025 Rusio. Interesigas pri vivo en aliaj landoj, pri kulturo, tradicioj. Kolektas poŝtmarkojn kaj bildkartojn.

Katja Belčeva, ul. Zvezda Nr.53, BG-4002 Plovdiv, Bulgario. 18 jara studentino de ekonomiko, ŝatas muzikon, dancon, kinon, literaturon kaj gitarludadon.

Koresponda Servo ĉe KLEG

Sonekigasi 1-11-46-204, Toyonaka-si,
561, Japanio.

Mi estas prezidanto de la Liuzhoua Esperanto-Instituto, kaj serĉas korespondajn partnerojn pri la E-movado, kulturo, scienco kaj komerco. Lan Tian Qiang, Shekelian Bangongshi 66, Sanzhon Lu, Liuzhou, Guangxi, Ĉinio.

Ildikó Merksz (H-2120 Dunakeszi, Munkás u. 16. Hungario), 17-jara lernantino, kiu interesigas pri muziko, transcendantaj fenomenoj, libroj deziras korespondi ĉefe el Usono, Aŭstrio, Francio.

Zoltán Kenessy, H-2132 Göd, Árpád u. 14/b, Hungario, kun intereso al naturo, volas korespondi ĉefe el Afriko, Aŭstralio, Usono.

Mi volas korespondi kun knaboj el diversaj landoj. Mi estas 13-jara knabo. Mi kolektas poŝtmarkojn kaj interesigas pri ludkomputiloj. Chimiak Rafal, ul. Korczaka 18, PL-64-920 Pila, Polio.

Marius Munteanu, 56 j. inĝeniero, Aleea Fratii Buzesti 3, ap. 17, RO-2400 Sibiu, Nagyszeben, Rumanio.

Traian Pasca, 35 j. teknikisto, str. Viilor 19, RO-2437 Cisanadie, Rumanio.

Aboneblo por la dua duonjaro!

Karaj legantoj,

ŝajne la decido startigi **EVENTOJ**-n ne jar-komence (kion kaŭzis eksteraj teknikaj cirkonstancoj) - havas siajn postsekvojn...

Laŭ la alvenintaj leteroj evidentas, ke la gazeton legas ne nur la abonintoj, sed ankaŭ iliaj konatoj, samklubanoj, ja ni ricevis multajn petojn kaj proponojn enkonduki aboneblon ankaŭ por la dua duonjaro "almenaŭ en la starta jaro".


Estis ja multaj, kiuj ne kredis reala la dusemajnan apertimon, kaj decidis iom atendi por vidi la rezulton. Por ne elspezi por la malnovaj numeroj, la abono por nur la dua duonjaro ebligas al ili estonte (sed ankoraŭ ĉi-jare) regule ricevi kaj legi la gazeton.

Do, finpensinte la aferon, ni decidis enkonduki tiun abontarifon, kiu validas inter la 1-a de julio kaj 31-a de decembro 1992. Abonkotojn por la unuopaj landoj vi trovas en la apuda tabelo.

Ni tre ĝojus, se pri tiu ebleco vi informus ankaŭ viajn konatojn, amikojn. Se vi estas kontenta pri la ĝisnunaj numeroj, ni dankas vian ĉi-rialtan helpon.

Kun samideanaj salutoj

Szilvási László



SONKASEDO!

Fama verko de la fama komponisto en esperanto!

Registraĵo de viva koncerto kun profesiaj operokantistoj.

Teksto sur la interna kovrilo de la sonkasedo.

Prezo: 18 NLG.

Mendu ĉe la redakcio!

Kiel aboni EVENTOJ-n?

1. Plenigu la abonilon, aŭ skribu leteron kun la sama enhavo, kaj sendu ĝin al la redakcio (LINGVO-Studio, H-1675 Budapeŝt, pk. 87. Hungario).

2. Pagu la abonkotojn al vialanda peranto listigitaj sube en la koncerna nacia valuto kaj sumo. (Se estas indikita dolaro anstataŭ vialanda valuto, tio signifas ke vi devas pagi la aktualan ekvivalenton de tiu sumo en vialanda valuto).

3. La revuon vi ricevos rekte el Hungario perpoŝte.

Kiel pagi?

- Sendu la kotizon al vialanda kotizperanto (perpoŝte aŭ poŝtĝirkonte) - en nacia valuto.

- Sendu la monon al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, kodo ELLS-S, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

- Sendu la monon rekte al la redakcio per simpla internacia poŝtmandato, aŭ perbanke al Banko OTP, Budapeŝt XVIII, Konto 218-98189/542-030808-7. Vi povas sendi ankaŭ euroĉekon. La valuto sur ĝi devas esti en ajna tipo de konvertebla valuto. Sur la dorsa flanko nepre skribu la numeron de via bankkarto!

- En fina kazo - je via risko - sendu monbiletojn (en konvertebla valuto inkluzive forintojn) en fermita koverto al la redakcio.

Landaj kotizperantoj

Aŭstrio: Leopold Patek, Martinstr. 104/38, A-3400 Klosterneuburg (pĉk. 7.127.144).

Belgio: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk-lei 140, B-2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43).

Brazilio: Brazila Esperanto Ligo, Carlos Maria, Cx. Postal 03625, Brasilia-DF, 70084.

Britio: Paul Hewitt, 26 Higfield Rd, North Thoresby, Grimsby, S. Humbs, DN36 5RT.

Ĉeĥoslovakio: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Vladimír Dvorak, Jiřska 10, CS-110 00 Praha-1.

Danio: Eckhard Bick, Rugbjergvej 98, DK-8260 Viby-J.

Francio: UFE, 4. bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk. 855-35 D Paris).

Germanio: Monda Merkato, Alfred Schubert, Pf. 1539, DW-8120 Weilheim, (konto 365255-806, postgiroamt München, BLZ 700 100 80).

Hungario: LINGVO-Studio, H-1675 Budapeŝt, pk. 87.

Hispanio: Juan Azcuénaga Vierna, General Dávila 127, p.7, 2º izda, E-39007 Santander (Cantabria) Bankkonto ĉe Caja Postal n-ro 03548531 (O.P.).

Israelo: Aviv Faklieru, Pk. 8383, IL-61083

Tel-Aviv, (konto 403679, Bank Mizrahi, Faklieru Esperanto).

Italio: Itala Esperanto-Federacio, villa Villoresi 38, I-20143 Milano (pĉk. 37312204).

Korea Respubliko: Seula Esperanto-Kulturcentro, Lee Jung-kee, 100-630 C.P.O. Box 3047, Seoul.

Kroatio: Kroatia Esperantista Unuiĝo, Marija Beloŝević, Trg burze 2, 41000 Zagreb.

Norvegio: Esperantoforlaget, Olaf Schous vei 18, N-0572 Oslo, poŝtĝirokonto 0809 5100318.

Polio: P.W.H. NEPO, skrytka 105, Maciej Wnuk, ul. Broniewskiego 77. m. 137, PL-01865 Warszawa.

Portugalia: Libroservo de Portugala Esperanto-Asocio, Antonio Martinus, Rua rd. Joao Conto 6, R/C-A, P-1500 Lisboa.

Sud-Afriko: Colin Beckford, P.O. Box 1227, Cape Town, 8000.

Svedio: Sveda Esperanto Federacio, SEF, c/o Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-242 94 Hörby.

Svislando: Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen.

Venezuelo: Prof. J. E. Bachrich, Apartado 70782, Caracas 1071 A.

● Esperantistoj el eksa Sovetunio, Rumanio kaj Bulgario ĉi-jare ankoraŭ povas aboni la gazeton kontraŭ 10 dolaroj.

Kotizoj por 01.07.-31.12.1992.

		Eventoj surface	Eventoj aere
Aŭstrio	ATS	177	+30
Belgio	BEF	550	+75
Brazilio	USD	8	+2
Britio	GBP	9	+2
Ĉeĥoslovakio	KCS	170	—
Danio	DKK	100	+20
Francio	FRF	90	+15
Germanio	DEM	27	—
Hungario	HUF	470	—
Hispanio	ESP	1800	+300
Israelo	USD	9	+2
Italio	ITL	18000	3000
Korea Resp.	USD	8	+2
Kroatio	USD	9	—
Norvegio	NOK	100	+20
Polio	PLZ	90000	+15000
Portugalia	PTE	2200	+300
Sud-Afriko	ZAR	40	+10
Svedio	SEK	100	+13
Svislando	CHF	24	+3
Venezuelo	USD	8	+2
ĉiuj aliaj landoj	NLG	30	+4

sendu al **EVENTOJ**, H-1675 Budapeŝt, pk. 87. Hungario

ABONILO

Jes, mi abonas la gazeton **EVENTOJ** por la dua duonjaro de 1992!

Nomo de la abonanto:

Preciza poŝta adreso:

..... poŝta kodo:

La abonprezon de (sumo) mi pagis al:

Dato: Subskribo: